

Ni petas bone noti

la novan adreson

de Scienca Revuo:

de Prof. d-ro Bož. Popović, **Teknika fakultato, NIŠ, Jugoslavio**

Je tiu adreso la ĉefredaktoro atendas pli multajn artikolojn, lingve korektajn, prespretajn (tajpitajn klare, kun interspacoj, nur unuflanke).

Je tiu adreso oni atendas ankaŭ pli multajn kaj regulajn abonojn — **la revuo aperos regule nur se la abonoj venados regule!**

SCIENCA REVUO, eldono de Internacia Scienca Asocio
Esperantista, Vol. 17, n-ro 3-4 (1966)

001.4+415.4:408.92:

NORMLINGVA ESPERANTO

(M. Halvelik, Borgerhout, Belgio)

FREMDVORTOJ

Plej alta ŝtupo de ĝia evolua mekanismo estas plenorganizo kie antaĝe ekzistis nur ĥaoso. El tiu vidpunkto la kreitaĵo de Zamenhof estas pli natura ol iu ajn nacia lingvo. Ne nur ĉar ĝi estas tute logika sed ankaŭ samtempe dinamika, tio estas adaptkapabla. La sekreto de tiu sukceso kuŝas en rezervujo de unuopaj kaj unikaj bazelementoj, la vortradikoj, kiujn oni povas intermiksi kaj ŝanĝi per la aplikado de same unikaj kromelementoj, la afiksoj. Esence tre simpla alĝutina koncepto kies principon oni trovas ankaŭ en multaj naturaj procezoj, ebligas ke ĉiuj homaj pensoj, ĉiuj objektoj trovas apartan esprimon — estu ili praktike sennombraj. Eĉ ankoraŭ neekzistantaj aŭ neimageblaj ideoj trovas en ĝi garantiitan spegulbildon. Ne necesas emfazi tiun punkton ĉar la legantoj esperantistaj estas jam plene konvinkitaj.

Sed la fakto ke Esperanto estas admirinda kaj genia inventaĵo, ne malhelpas ke ĝi ankoraŭ ne estas absolute perfekta komunikilo.

Estas unu elstare grava manko en ĝi. Manko por kiu la majstro ne trovis solvon, kvankam li tre bone konsciis pri ĝi kiel atestas lia 15a regulo. Efektive: temas pri la fremdvortoj, pri tiuj malagrablaj puloj kiuj insisteme mordetas nian verdan haŭton. Ili ne apartenas al la fundamenta raso de vortoj.

Stariĝas la demando: kial ne?

Nu, estas publika sekreto ke naturscienculoj formas ridige malaltan pocenton en la sociaro de Esperantujo. Da beletro ni posedas abundege, sed ekzaktsciancan literaturon ni kalkulas sur la manfingroj. Naturalismaj konkurantoj de nia lingvo male, kvankam ili estas ne-logikaj kaj komplikitaj kompare al Esperanto, allogas preskaŭ ekskluzive teknikistojn. Nun estas ĝuste la specialistaro kiu en la nuntempa epoko — pro vasta etendiĝo de natursciencoj kaj tekniko — plej akre bezonas internacian lingvon. Se ili do prefere transiras al naturalisma planligvo tio devenas de la fakto ke tia rivalsistemo klopodas kiel eble plej fidele konservi la helenlatinajn terminojn kiuj estas por ni fremdvortoj, sed kiuj formas la tradician bazon de ĉiu ekzaktscienca instruo. Io laŭaspekte familiara ŝajnas pli oportuna ol io laŭaspekte fremda — eĉ se ĝi kaŝas en sia sino iun malracion aŭ fuŝorganizon. Estas nur ĉe ioma enprofundiĝo en la subtenantan lingvoskeleton ke oni rimarkas la grandan simplon de skemismo vide al la kompliktieco de naturalismo. Sed tiam la decida paŝo estas jam farita kaj ĉitiel ni perdas ĝuste tiun specon de kandidatoj kiuj plej facile povus venkigi la ideon pri internacia planlingvo. Bela knabino facile kaptas fianĉon eĉ se ŝi estas insidema megajro, dum malbela knabino postrestas eĉ se ŝi estas sinofera penelopo. Feliĉe por ni, Zamenhof-laŭ deklaro de Vinobha Bhave-estis grandanimulo, kaj tiu heroe bonkora pioniro kaj genia epokfaranto testamentis al ni la netakseble potenca psikologian puŝforton kiun ni nomas »la interna ideo« pri mondpaco, homaraneco kaj samideaneco. Estas, tiu interna ideo pli ol iu ajn planlingva kvalito, kiu entuziasmigis vastajn amasojn da homoj por Esperanto kaj kiu ankoraŭ daŭre enflamigas junajn idealistojn. Ĝi sekurigis al la movado ĝian hodiaŭan disvolviĝon... en »ordinaraj« kaj kultursciencaj medioj. Cetere ankoraŭ la historia bonŝanco ke naturalismo (per Occidental, Novial, ktp) aperis nur poste, ludis je nia avantaĝo.

Sed por la — ni dirus preskaŭ »esence« — pragmatisma medio de la teknikistaro tiu faktoro idealisma ne ludas gravan rolon. Tie oni interesiĝas ĉefe pri la praktika ebleco interriliti kun eksterlandaj gekolegoj pri la komuna fako. Kaj ĉar la Fundamento de Esperanto ne provizas la helenlatine vestitan sistemon, necesan al tiu celo, oni ĝin ne konsideras valida. La ekzemplo de Sinjoro Wüster, al kiu ni

ŝuldas i. a. la »Enciklopedio de Esperanto« estas elokventa ĉirilate. Kvankam fidela kaj bonega zamenhofano, li klopodadas standardigi la internacian sciancan terminologion sur tereno fremda al la klasika Esperanto. Konsekvenco, ne de la ĝenerala koncepto pri Esperanto kiel komunikilo inter popoloj (ĝi ja multfoje pruviĝis taŭga en tiu rilato) sed jes kiel komunikilo inter fakuloj. Oni povas diri koncize ke Esperanto estas **socilingvo** sed ne **normlingvo**.

Sekve, se ni volas trovi rimedon por forigi la malakordon inter skematismo kaj naturalismo je la avantaĝo de Esperanto, ni devas trovi rimedon por adapti la fundamentan lingvomaŝinon ankaŭ al helenlatina vortamterialo aŭ inverse. Tiucele ni reanalizu iom pli detale la aglutinajn metodojn de D-ro Zamenhof kaj de la helenlatina nomenklaturon.

Pli da normigo inter la afiksoj

Esperanto apogas sin sur fundamenta trezoro de radikvortoj aŭ »semantoj« kiuj esprimas bazajn ideojn (**manĝ' blond' arb'**). El tiuj fontideoj ni devenigas flankideojn pere de alkroĉeblaj afiksoj (**ekmanĝi blonda arbaro**). Ĉiuj ĉi eroj povas esti sisteme kunligataj por formi eĉ pli kompleksajn pensojn (**manĝilarujo, blondkapula, arbhakisto**). Sed ekster la fundamenta listo de ideradikoj ekzistas ankoraŭ multe pli da ideoj kiuj postulas envicigon en la lingvotrezoron. Tiuj estas la novaj vortradikoj kiujn oni nomas fremdvortoj aŭ neologismoj, kaj kiuj daŭre aperadas, parte inventataj-kaj lerte-fare de niaj verkistoj kaj poetoj (**aperti descendi rara**), sed ĉefe jam ekzistantaj en naciaj faknomenklaturaj (**elipsoido globulario pakidermoj**).

Se tiuj fremdaj gastoj permesus ke oni senpere kunmetadu kaj derivadu ilin, same kiel la fundamentaj terminoj kaj laŭ zamenhofa regularo, tiam estus nenia embaraso. Ili estas ja origine ne simplaj vorteroj, esprimantaj egale simplan ideon kiel niaj ceteraj radikvortoj, sed ili konsistas plejofte el pluraj kunligitaj ideoj aŭ el derivaĵoj de iu ideo. Se ekzemple »kudristino« konsistas semantike el »kudr + ist + in + o« kaj signifas konsekvence: »ina homo kiu profesie kudras«, tiam la faktermino de helenlatina deveno »palaeontologia« konsistas semantike kaj etimologie el »palaios + ontos + logos + ia« kio egalas proksimume »antikva + estaĵo + pritrakt + adi«, sed reale signifas: »scienco kiu studas la formojn de vivo kiuj ekzistis en antaŭaj geologiaj epokoj«. En tio ni rekonas sistemon de vortfardo laŭ principo tute similan al tiu de Esperanto. Kun la rezulto ke ni staras ĉe fremdvortoj ne antaŭ unuopaj terminoj, sed kutime jes antaŭ tuta aro de reciproke interkonektitaj terminoj. En Plena Vortaro ni trovas ekzemple la terminojn: »sisma, sismografo, sismo-

logio« **aparte** listigitaj kaj klarigitaj, dum laŭnature ili devus **aperi** sub unusola trafvorto kiel faras ekzemple: »paliso, palisaro, paliseto, palisumi« .

Sen nun tiuj fremdlingvaj kompleksaĵoj estus senpere tradukeblaj oni ankaŭ egale simple formadus tutesperantajn egalvaloraĵojn ek de la baza scienca radiko kaj la supra ekzemplo aldoniĝus al nia planlingva trezoro kiel »Pra-est-aĵo-scienc-o«. Sed tiu procedo tute ne estas ebla pro du kaŭzoj:

Unue: la teknikaj fremdvortoj havas plejparte pli striktan aŭ eĉ alian sencon ol tiun kiun oni supozus en ili per simpla traduko »**Metamorfozo**« estas laŭsignife ne tute egala al »Transformiĝo« kaj »**Stratosfero**« estas eĉ tute alia afero ol »Sternkuglo« kvankam la konsistigaj fontideoj (bazaj radikoj) estas identaj (meta = trans, morf = form, ktp).

Due: eĉ se ni kontentige tradukus ekzaktsciencajn terminojn en ordinaran lingvaĵon laŭ **objektiva pritakso**, eĉ tiam restus la fenomeno ke tiuj socilingvaj egalvaloraĵoj ne akirus la **subjektivan karakteron** de la originaloj. Estas eble stranga sed nerefutebla fakto ke fakulo ne kontentiĝas per ĉiutagaj vortoj sed nepre postulas apartajn terminojn, proprajn kaj prefere eĉ ekskluzivajn al lia profesio. Jenan fenomenon oni povas konstati en ĉiuj evoluantaj lingvoj; se ne, tiam la helenaj kaj latinaj vortposteuloj estus jam delonge malaperintaj de sur la klerula merkato. Kiam ekzemple ordinara aŭ nefakula persono diras »majskarabo« li eble prezentas ali si enpense bildon el sia junaĝo pri infano ludanta kun insekto, prezentanta iujn amuzajn trajtojn. Sed kiam entomologo pensas pri tiu sama besteto ĝi fariĝas studobjekto abstrakta, kaj li eble imagas iun blankkartonan tabuleton sur kiu estas pinglita difinita genro de insekto el precize difinita biologia klaso kaj familio, trovebla en ĝuste tiaj klimataj aŭ sezonaj cirkonstancoj. Li pensos pri kelkaj specioj kun specialaj rekoniloj, pri anatomia mapo, pri organoj, fiziologiaj tipaĵoj kaj fenomenoj, pri vivciklo, nutrado kaj tiel plu kaj tiel plu. Fine ekzistos por li nur la genra grupo Melolonto, kaj li konsekvence ne parolos pri »majskarabo« krom en vulgara senco. Ĝi fariĝis tutaparta studobjekto anstataŭ ono de la ĝenerala naturo ĉirkaŭe kaj tio speguliĝas en la terminologio kie ni trovas **du** sinonimojn same necesajn. Se ne ekzistus la tiel nomataj »klasikaj lingvoj« por servi kiel fonto por la kreado de tiaj apartaj terminoj, la fakuloj tutcerte ĉerpus ilin el aliaj lingvoj, ĉu mortintaj ĉu vivantaj aŭ eĉ inventus ilin el nenio, kiel pravas la ĥemio.

Pro tiuj fakoj ni devige alfrontas teknikajn terminojn laŭaspek- te kontraŭ-zamenhofajn kaj neasimileblajn. Kapablante nek eviti nek diserigi ilin, ni estas devigataj ensorbi la fremdvortojn kvazaŭ temus pri tutecaj nekompletaj radikoj. Iom da ŝanĝo en la literoj por kon- formigi ilin kun la fundamenta alfabeto, aldono de iu fundamenta sufikso, kaj ni staras finfine per neologismoj trufitaj kiel festrostaĵo. Jen paliativa metodo kiu kondukas rekte al konfuzo kaj kiu krimas kontraŭ la 15a regulo! Juĝu mem: »... sed ĉe diversaj (fremd-) vortoj de unu radiko estas pli bone uzi senŝanĝe nur la vorton fundamentan kaj la ceterajn formi el tiu ĉi (lasta) laŭ la reguloj de la lingvo Esperanto«. La majstro nur ne indikis kiel ni funkciigu tiun bonegan regulon.

Ĉu oni ankoraŭ miras ke sciencistoj malinklinas interŝanĝi sian nacian helenlatinan lingvosistemon por planlingvo kiu en tiu rilato ne posedas sistemon? Des pli ĉar ili estas jam de longe kutimiĝintaj al la propra nacia lingvosistemo, estu ĝi malfacilega kaj kaprica. Unufoje akceptinte Esperanto-veston por siaj helenlatinidaj terminoj, ili trovas neniun vojon por pluen derivadi kaj kunmetadi laŭ propra bezono kaj devas ĉiam denove alvoki la helpon de naciaj kutimoj. Ĉu Prof-ro Neergaard scipovis forĵeti la helenlatinan sistematikon pri botaniko aŭ D-ro Duncan la anglan nomenklaturon pri ĥemio por kontentigi sin sole per Esperanto-materialo? Ne, kaj tamen ili estas kompetentaj fakuloj kaj spertaj esperantistoj. La malforto kuŝas ne eĉ la uzantoj sed en la internacia lingvo mem.

Se vi nur povus konsideri la helenlatinajn vortradikojn kaj afiksojn kiel niajn fundamentajn, tiam ni povus ankaŭ plene apliki la 15an regulon kiu ja reprezentas la tutan zamenhofan konstruaĵon en nuksoŝelo. Se nur radikoj kiaj »anthrop /bio/ geo /neuro« aŭ se sufiksoj kiaj »-os -ic -is -ia -oid« estus familiaraj vorteroj! Sed ne estas tiel. Ŝajnas ne kreski medicinaĵon por tiu ĉi terura embaraso kiu taŭzas la memoron kaj devigas la internacian lingvon treni post si fremdan, malamikan korpon kvazaŭ ĝi estus punlaborulo kun metala kuglego ĉenita je la kruro.

Tamen nur ŝajne, pro tio ke ni estas blindigitaj de la netuŝebleco de la sanktege sankta Fundamento. Ja evidente: se ni volas fari naturan membron el neforigebla fremdkorpo, estas tute indikite reorga- nizi la ĉeftrunkon tiamaniere kaj tiomgrade ke la fremda membro fariĝu familiara organo, kvazaŭ branĉo elkreskinta kune kun ĉiuj aliaj branĉoj el la sama arbo. Ĉu ne klare? La solvo de nia problemo troviĝas en kreado de ĝuste tiaspecaj radikoj kaj afiksoj kiajn bezonas la fakularo kaj en la aplikado de (iom) aparta regularo por ke ne estiĝu intermiksiĝo de la nova »normlingvo« kun la tradicia

»socilingvo«. Tiamaniere ni metos kompletigan tegmenton sur la zamenhofan domon. Komprenoble tio ankaŭ devigos nin elpreni brikojn en strategiaj lokoj, movi aliajn kaj aldoni multajn por ke la tegolaro eksidu firme kaj elegante sur la muroj. Sed la muroj tamen restu starantaj, same kiel antaŭe. Alivorte: ni estas devigataj **IOM ŝanĝi la Fundamenton de Esperanto SEN PRO TIO KRIPLIGI** aŭ eĉ frakasi ĝin. Ĉu sakrilegio, ĉu katastrofo, ĉu nova Ido-skismo? Tute ne!!

Novaj proponoj pri afiksoj

Post plurjara klopodado kaj funda elprovado, ni kredas esti sukcesinta atingi ĝuste tiun idealon. La ĝenerala temo de jena artikolo (ar)o bedaŭrinde ne permesas ĝisdetale demonstri nian metodon normlingvan, ĉar tiukaze estus necese konsideri ankaŭ la metodojn de klasifado de ĉiu scienca disciplino aparte. Ni donas ĉisekve sole la generalajn principojn kun kelkaj ekzemploj:

a. **La unua ŝtupo** kiun ni proponas, estas raciigo kaj simpligo de ekzistantaj neologismoj aŭ eĉ de jam oficialaj fremdvortoj, helpe de klasikaj rimedoj.

di-ism-o	anstataŭ	deism-o
balustr-ar-o	anstataŭ	balustrad-o
beletr-o	anstataŭ	beletrist-o
raci-ist-o	anstataŭ	racional-ist-o

b. **La dua ŝtupo** jam pli grava, estas adopto de novaj afiksoj. Detala analizo de fremdvortaj serioj malkaŝas ke la diferencoj rezultas preskaŭ ekskluzive el malkonformaj finaĵoj. Komprenoble, D-ro Zamenhof devis ja fari i u n elekton inter la multnombregaj derivaĵoj kiujn oni povas fari en principo. Tial li rezervis sian sistemon de afiksoj por tiuj kromsignifoj, kiujn la ĉiutaga vivbezono indikas; sekve por socilingvaj postuloj: »il, ej, ad, ind, eks, ...«. Sed normlingvo, kiu celas la bezonojn de scienco kaj tekniko, postulas nociojn kiaj: »fako, parenca, malsano, aparato, ŝtatorganizo, abstraktaĵo...«. En la tradicia lingvouzo oni kutimas formi tiujn nuancojn per kunmetado sole de radikoj kiaj respektive: »konstrufako, homsimila, brustmalsano...«. Pro tio ni kreis la liston (same respektive kaj sinsekve): »ik, esk, ajt, ator, ij, el...«

geo-metr-ik-o	anstataŭ	geometri-o
fab-esk-oj	anstataŭ	fabac-oj
apendic-ajt-o	anstataŭ	apendicit-o
indik-ator-o	anstataŭ	indikator-o
federal-ij-o	anstataŭ	federaci-o
numer-el-o	anstataŭ	numeral-o

c. **Tria kaj baza ŝtupo** estas estigo de normlingvaj vortradikoj kiuj estu kiel eble plej simplaj kaj kiuj samtempe simulu la originalajn helenlatinajn formojn, sen pro tio iĝi homonimoj de socilingvaj kolegoj.

hepo-potam-o	kaj	hypo-tez-o	pro	hipotenuz-o
poly-naŭm-o	kaj	astro-nojm-o	pro	nom-o
dija-gram-o	kaj	diha-krit-a	pro	diadem-o
aero-plajn-o	kaj	plane-metr-ik-o	pro	plan-o
pery-tone-o	kaj	hypo-taŭn-a	pro	ton-o

d. **Kvara ŝtupo**, eventuale aldoninda al la du antaŭaj, estas plisimpligo kaj (aŭ) adapto de unublokoj radikoj — indiferentaj rilate al normregularo — kies ŝajne kunmetita aspekto aŭ morfema finaĵo povas kaŝi dusencecon aŭ homonimecon. Ĉi tiu paŝo tamen devus esti finfine afero de interkonsento interne de nia Akademio, tial ke ĉiu aparta vorto de jena speco estigas balancadon inter progresemo kaj tradiciemo. Arbitra raciigo fare de izolita unuopulo ne ĉiam estas fidinda kriterio en tia demando.

intuico	anstataŭ	intucio	pro	balasta	-i
rifrendo		referendumo		falsa	-um
dalmatico		dalmatiko		falsa	-ik
braceledo		braceleto		falsa	-et

vide al »netuŝeblaj«; familio, serumo, praktika, epiteto...

Sed je ĉio la granda, la grandega, la nepre nepra dekreto estas **krei terminojn laŭ zamenhofa modelo!** La sintaksa ordo kaj ceteraj reguloj pri derivado kaj kunmetado restu validaj same kiel antaŭe. Ni provizis specialan regularon por ke ne okazu intermiksiĝo inter soci — kaj normlingvo, precipe la leĝon ke fundamentaj afiksoj restu ĉiam ligeblaj al normradikoj sed ne normafiksoj al sociradikoj. (Kontraŭ/seps/a aŭ Anti/seps/a sed ne Anti/star/i por Kontraŭ/—star/i).

ESENCA ESTAS LA DISTINGO KE EN SOCILINGVO GRAVAS LA ENHAVO DUM EN NORMLINGVO GRAVAS LA FORMO.

La unua estas elasta, la dua estas rigida. Ekzemple: »simiom« povas skribiĝi egale bone »simia homo, primata homo, homo simianta simion, primatulo, ...«. Ĝi estas por ni **semantika kompleksaĵo** kaj sekve la vortelektio estas libera. Sed la scienca egalajo: pitekantrop« estas kaj restas en efektiva teksto senŝange nur »pitekantropo«. Ĝi estas por ni **etimologia kompleksaĵo** kaj la vortelektio ne estas libera. Iuj legantoj eble juĝos tian distingon harfendaĵo. La nuanco

tamen estas grava pro siaj konsekvencoj. Ankaŭ baleno treege similas fiŝon sed ĝi estas envere mambesto. Jen ankoraŭ kelkaj ekzemploj kun la normlingva prefikso AN. kiu signifas socilingve »sen«: ano-fon-ec-o, ano-morf-a, an-arŝ-ij-o, an-emj-o ano-hidr-a, an-estez-i, ano-nym-a, ano-seps-o, ano-takc-o, ano-fylaks-o, an-alĝ-ec-o, kaj tiel plu anstataŭ la tradicie neartikigitaj kompleksaĵoj »afoni/o, amorf/a, anarĥi/o, anemi/o, anhidr/a, anestez/i, anonim/a aseps/o, ataksi/o, anafilaksi/o, analgezi/o, kaj multaj pli.

Du partioj en Esperanto, nome unu socilingva kaj unu normlingva, ne signifas du malamikaj fratoj sed jes du reciproke komplementaj geedzoj formantaj unu saman planingvon. Ke iu socitermino havas multajn normajn sinonimojn aŭ tute neniun, tio estas flankafero, ĉar ĉiam ĉiu partio celos nur sian propran publikon. Ĉiutaga socitermino, jes. Scienca normtermino, jes. Sed ambaŭ unu lingvo: Esp-o! **Blinda** timo antaŭ neologismoj, vidu, estas ne nur malracia kaj malutila sinteno, sed tute nenecesa. Je preteksto konservi la lingvon pura, oni malhelpas ĝian plenan disvolvigon kaj baras la vojon al la teknikista tendaro.

Tiom pri la gajno en la tendaro esperantista. Sed ankaŭ la teknika kasto mem gajnos multon. **Unue:** kreado de normlingva Esperanto samtempe ebligas raciigon de la internacia nomenklaturaro en ĉiu natursciencaj disciplinoj; speciale en botaniko, zoologio, kaj ĥemio. Esperanto ja estas ankoraŭ relative juna, virga ilo sen kompleksoj aŭ misformaĵoj el pasintaj jarcentoj kiaj konfuzigas la naturajn lingvojn. Ĝi do kapablas ekiri de tutfreŝa startejo kie la naciaj idiomoj baraktas en tradicia dornejo. **Due:** ni liberigos la natursciencistojn de la bezono studi helenan kaj latinan lingvojn. Ne ĉesas aperi ardaĵoj disputoj en la gazetaro pri la peza ŝarĝo kiun reprezentas la klasika filologio por sciencistoj. Kie tiuj ĉi en principo tute ne bezonus sin okupi pri antikvaj idiomoj kaj beletro, pro tute alie orientitaj fakintereso, ili tamen estas devigataj vole nevole, dum siaj antaŭuniversitataj jaroj, blasfemante kaj ŝvitante fosi al si sulkon tra terure komplikaj gramatiko kaj literaturo el longe forpasintaj epokoj. Dume ili bezonegas ĉiun liberan minuton por prepari sin al profesio kiu havas neniun faktan rilaton kun tiuj fosiliaj tempoj kaj kiu fariĝas konstante pli ampleksa kaj malfacile regebla.

Nun, per internacia lingvo, adaptita al specialismaj bezonoj, neniun studento perdos ankoraŭ tempon en nenecesa penado nek super fremdnaciaj, nek super arkaikaj lingvoj. La helenlatina filologio reiros al sia propra laŭrajta sed plimodesta loko, nome al la studado de antikvaj kulturoj, literaturoj regnoj. Ĝi ekokupos egalgrandan pozicion apud aliaj klasikaj studoj kiaj la egipta, ĉina, hinda,

hebrea, ... estante nek pli nek malpli valora laŭ pure historia aŭ lingvistika vidpunktoj. Des pli ĉar nun ankaŭ la Katolika Eklezio, tiu lasta bastiono de Latino, komencas cedi lokon al naciaj lingvoj en sia liturgio.

Venis cetere tempo por ke la »okcidenton sola« — pensmaniero, kiu ĝis nun restis malvaste sklaviĝinta al sia helenlatina heredaĵo larĝigu sian horizonton al tutmonda kulturo.

Ampleksiginte la artverkon de Zamenhof tiele ke ĝi nun konformas ankaŭ al la ekzaktsciencaj aspektoj de la civilizo, ni povus atribui al ĝi diplomon »Kun plej supera laŭdo« kaj samgeste fini la ĉapitron. Povus ... se ne restus kaŝita en la lingva foliaro ankoraŭ alia danĝero, ekstreme venena vipuro; nome la prononcado kaj skribado de propraj nomoj! Jen temo kiu embarasas ĉiujn naciajn idiomojn ĝenerale kaj nian internacian idiomon tutspeciale. Tial ni deziras dediĉi al ĝi apartan pritrakton kaj intence neglektis ĝin ĉi tie.